

BULTENO

DE ESPERANTISTA KLUBO ĈE
OSVĚTOVÁ BESEDA EN PRAHA 2.



Nro 8.

Novembro 1953

Aperas laŭbezone

Karaj gesamideanoj,

post la disiĝo de EACSR, nia ĉefa esperantista organizaĵo, transprenis la taskon gvidi nian movadon la Klubo. - Ĉirkaŭ la kluboj koncentriĝas nun la tuta vivo esperantista. Pli ol iam antaŭe prirespondas la kluboj la kulturen nivelon de la movado. Ne havante centran oficon, la kluboj devas mem zorgi pri informado, instruado, klerigo kaj pri la aranĝo de programoj. Ĉio ĉi, kune kun multaj aliaj devoj, ne estas plenumbla sen la rimedoj, sen apogo kaj oferemo de niaj membroj!

La sukceso kaj fina venko de la ideo pri LINGVO INTERNACIA grand- parte dependas de esperantistoj mem. La sukcesojn oni taksas laŭ agoj, kaj neniel laŭ belaj revoj. Ĝus nun, kiam la rigardoj de la tuta mondo komencas serioze esplori Esperanton kaj gravaj institucioj dediĉas sin al problemo lingva, necesas plej firme teni la ĝis nun atingitajn poziciojn!

Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante
ni iru la vojon celitan!

(L.L.Zamenhof: La Vojo)

La voĉoj de PIONIROJ DE LA PROGRESO vokas nin. Kion ni celas? - Venos la tempo, kiam ni prezentos la rezultojn de nia agado al la vasta publiko. Neniu samideano rajtas stari flanke, ĉiuj iru kun ni! Vizitu niajn kunvenojn, kontribuu ĉiu laŭ sia povo! Ankaŭ Vi, kiuj estas mal-proksime de nia klubo, venu almenaŭ de tempo al tempo, subtenu nian laboron, raportu pri Via agado perletere. Aliĝu al nia Klubo, por ke ĝi povu digne reprezenti la movadon per nombro kaj kvalito!

ĈIU ALIĜANTO RICEVAS SENPAGE LA KLUBAN BULTENON !!!

Ŝ.U.

Mirinda vojo de ĉeĥa versaĵo.

Antaŭ kelkaj jaroj altiris mian intereson artikolo en ĉeĥa studenta gazeto pri Bohuslav Bárta, gimnazia studento en orienta Bohemio, kiu estis ekzekutita de naziistoj pro aktiva patrujamo. En lia persono estis murdita la ĝermo de talenta poeto, kiu antaŭsentis sian morton kaj ĝian manieron, kaj esprimis tion, longe antaŭ la aresto, en versa surskribo por propra tombo.

Kortuŝite mi reverkis la artikolon, kun versa traduko de la epitafo fare de Dro Pumpr, kaj elsendis ĝin en Esperanto per la Radio Praha. La bulgara "Internacia Kulturo" publikigis ĝin en esperanto kun portreto de Bárta, donacita de liaj gepatroj.

Post iom da tempo mi ricevis el Kopenhago tondaĵon el la tagĵurnalo LAND OG FOLK kun danlingva retraduko de la prozo, kaj ankaŭ de la epitafo, farita laŭ "I.K." Kaj nunjare trafis en miajn manojn japana poemlibro - SEKAI KAIHO ŜISU (Monda Liberiga Kantaro), en kiu mi rekonis i.a. konsultinte scianton de la japana lingvo, la epitafon de Bárta en japana vesto. Ĝi estis ankaŭ tradukita laŭ tiu en "Internacia Kulturo".

Ĉu ne estas mirinda la vojo de tiu ĉeĥa versaĵo?

Tiel servas Esperanto!

J. Mařík

Legu la Epitafon sur la dua paĝo:

Bohuslav Bárta:

EPITAFIO

Kiam disiĝis fum' post batalbruo
kaj brilis mola sun' sur barikadoj,
jen meze de l' falintaj kamaradoj
sur strato kuŝas juna knab'
kaj sango fluas el la kap'
tra pafotruo.

La vivon amis li kaj pri ĝi kantojn faris,
sed kiam venis temp',
silente iris li kaj falis.

Trad. D-ro Tomáš Pumpr.

Geedziĝo: Niaj membroj Saša Vavříčková kaj Jan Neumann geedziĝis la 21-an de oktobro 1953 en Praha. La juna paro akceptu nian sinceran bondeziron!

Prof. D-ro Stan. KAMARÝT 70 jara. La 10an de novembro 1953 atingos nia ŝatata membro d-ro Stan. Kamarýt 70 jarojn de sia vivo, el kiu li pli ol 50 jarojn dediĉis al Esperanto. Li staris ĉe la lulilo de Esperantista Klubo en Praha, kaj lia aktiveco neniam ĉesis, neniam laciĝis. Ke li ankoraŭ longe vivu kaj laboru sur amata lia laborkampo sincere al li deziras nia Klubo!

ESPRANTISTA KLUBO EN PRAHA kunvenas ĉiumerkrede je la 20a horo en granda kunvenejo de restoracio "U Šumavy", Praha II, Štěpánská 3.

Jen la programo de venontaj kunvenoj:

28.X.1953 VESPERO DE FRÁŇA ŠRÁMEK.

Aranĝas: Suchardová, Seemann kaj Mařík.

Muzika kunlaboro D-ro Jetel.

Kantas Vlasta Rudičová.

4.XI.1953 GAJA VESPERO. Aranĝas JUNULARO, gvidas Ant. Slanina.

11.XI.1953 AKADEMIO DE ESPERANTO. Paroladas Ph.Dr. Aŭg. Pitlík

18.XI.1953 KULTURAJ RILATOJ inter ĈEĤOSLOVAKIO kaj NEDERLANDO en pasintaj tempoj. Parolas Dolfa Bortošík.

25.XI.1953 Anstataŭ ĝenerala kunveno: RAPORTO PRI AGADO DE LA KLUBO en la jaro 1953. Parolos la funkciuloj.

2.XII.1953 --- Ĉu venos sankta Nikolao?

En proksima tempo ni intencas malfermi konversacian kurson por progresintoj. Gvidos s-o R. Hromada. Detalojn Vi aŭdos dum niaj kunvenoj.

MONUMENTO DE NACIA LITERATURO. La antikva monaĥejo de Strahov en Praha estis transformita en "Monumenton de nacia literaturo", laŭ amplekso kaj laŭ enhavo grandiozan muzeon de nia kulturo. Ĝi montras evoluon de ĉeĥaj lingvo kaj literaturo depost ilia ekesto ĝis plena disfloro en la jaroj 1880-1890. Ĉi tiu modesta Bulteno ne sentas sin kompetenta doni priskribon de la interesej kolektoj, sed rekomendas varme viziton. En du lokoj ni trovis tie mencion pri nia lingvo En unu de la vitrinoj de la ĉambro de Božena Němcová estas noto, ke ŝia "Avineto" aperis en esperanta traduko en la jaro 1909. Kaj ni estis iom surprizitaj pri informiteco de la aranĝantoj, kiam ni trovis en fako de Karel Hynek Mácha informon, ke lia verko "Majo" estis tradukita en Esperanton. Tiu traduko ja ekzistas sole en manuskripto.

HEROLDO DE ESPERANTO. Nia poŝto rifuzas akcepti tiun revuon kaj resendis nun sinsekve la 12an kaj 13an numerojn, antaŭe ankaŭ duonan kvanton de nro 8, refoje alsenditan. Ni ne povas diri, ĉu niaj instancoj ŝanĝos sian opinion.
